

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRÉSIENY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns	76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov.	59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie	49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon	59000 LILLE
Paranto I.K.U.E: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d'Orves	54490 PIENNES
C.C.P: Association Catholique Française pour l'Espéranto 2324 93 N ROUEN	

==== la n^o: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sumo: 30 F. ====
XX

==== N^o 162 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== SEPTEMBRO 1989 ====

XX

BILETO DE LA PREZIDANTO

Les vacances sont maintenant terminées et chacun les a utilisées au mieux pour refaire ses forces et enrichir son esprit. Beaucoup d'entre nous ont participé aux congrès et rencontres espérantistes.

Il convient donc de nous tourner résolument vers l'avenir et d'apporter à nos frères chrétiens et espérantistes la Lumière et l'Espoir que seul le Christ peut donner à un monde de plus en plus matérialiste et inquiet de son devenir.

L'idéal de fraternité et de compréhension réciproque qui a toujours animé le mouvement espérantiste doit nous permettre, par la pratique de la Langue Internationale, de témoigner avec ardeur et confiance de l'Espérance chrétienne dont nos contemporains ont tant besoin.

A. B.

TRADUKO

Finigis la ferioj kaj ĉiu uzis ilin por refreŝigi kaj riĉigi sian spiriton. Multaj el ni partoprenis Esperanto-kongresojn kaj renkontojn.

Necesas, ke ni kuraĝe turnu nin al la estonto kaj alportu al niaj kristanaj fratoj esperantistoj la Lumon kaj la Esperon, kiujn nur Kristo kapablas doni al mondo pli kaj pli materialista kaj zorga pri sia ~~estonto~~ estonto.

Tiu idealo pri fratiĝo kaj reciproka interkonprenado, kiu ĉiam inspiris la Esperanto-movadon, ebligu al ni, per la praktiko de la Lingvo Internacia, arde kaj plenfide atesti pri la kristana Espero, kium tiel bezonas niaj samtempuloj.
XX

RESUMO DE LA BILETO DE LA JUNIA NUMERO (Ĝi atingis nin post la presado)

Depost la Franca Revolucio, kiu igis nian landon laika respubliko, tio signifas rompon inter la civilaj aŭtoritatoj kaj la religiaj instancoj, la kristanoj troviĝas en nova situacio sur la tereno de la kredo, same kiel ankaŭ de la moralo kaj edukado. Por multaj politikistoj de niaj sinsekvaj respublikoj, laikismo signifas ne nur apartigon, sed enuligon, menigon de la religiaj valoroj de la kulturaj kaj sociaj heredaĵoj de nia popolo.

.. / ...

Iuj esperantistoj, pretekstante la neŭtralecon de la lingvo, kontestis la taŭgecon de religiaj organizaĵoj en la universala movado. Male, Esperanto kaj religio atestas la unuecon de la homa naturo. Ambaŭ vojoj celas la saman, super la diverseco de opinioj, de institucioj, en unuiĝo harmonia, fare de reciprokaj toleremo kaj kompreno.

Por la kredanto, la kreitaĵoj estas vokitaj, en la dia projekto, al la savo, anoncita de Kristo, ampleksanta ĉiujn tempojn de la tuta universo. Per la Espero kaj la Amo, dediĉitaj al ĉiuj homoj, ni kontribuas al la realigado de la dia volo, al la konstruado de la homara unueco, en universala Paco.

R. Cl. C.

+++++

KARITATOFERMENTO

Ho Dio, Patro de ĉiuj homoj
Vi petas nin porti
la amon, kie la malriĉuloj estas humiligitaj,
la ĝojon, kie la Eklezio estas konsternita,
la repacigon, kie la homoj estas dividitaj.

Helpu do nin repacigi:
la patron kun la filo,
la patrinon kun la filino,
la edzon kun la edzino,
la kredanton kun la nekredanto,
la kristanon kun la kristana frato, kiun li ne amas.

Vi malfermas al ni tiun vojjon,
Por ke la Eklezio
Vundita korpo de Jesuo-Kristo,
Estu fermento de karitato
Por la malriĉuloj sur la Tero
Kaj en la tuta homa familio.

Patrino TEREZA

+++++

KOLOMBO, SIMBOLO DE PACO (daŭrigo)

Ordinare, etaj kolombidoj manĝas nur kion donas la gepatroj el sia beko. Ili bonege komprenas, ke la gepatroj ilin amas plej forte kaj tial povas doni al ili nur bonan, nur utilan manĝaĵon.

Sed jen 28-taga kolombido jam eksentis sin tute memstara. Li jam kuraĝe formaniĝis, kiom alportis mi, kaj post la matenmanĝo leviĝis en aeron...

Mi rimarkis plian aferon por mi ne kutiman. Tiu 4-ana familio birda trovis ie iun parencon, aŭ tute fremdan birdidon - orfon. Mi tute ne scias, kiu ilin interkonatigis, mi vidas nur, ke en mia balkono jam loĝas kvinopo. La kvina, blankvostulo, ŝajne trovis ĉi tie propran familion. La adaptito sin sentis vere kiel hejme.

Kiom grandega ĝojo regas inter homoj, se iliajn orfojn amkaŭ ĉirkaŭus muraj gepatroj kaj gefratoj. Ĉu do restus en mondo loka por militoj, se ĝin komplete plenigus amo frateca?

Mi vidis foje, ke ĉiuj 3 idoj dormas simple starante... O homoj, ĉu ni neniam hontas vidante ilin? Ni serĉas por ni molan oportunan liton, konvenan temperaturon en la ĉambro, dume la flugiluloj zorgas pri nenio.

Oni diras, ke kolomboj ja nenion perlaboras, ili nur manĝas senmerite. Sed ili ja produktas bonegan sterkon, kium homa saĝo kaj manoj povas transformi je amaso da cepoj, karotoj, tomatoj... Ili do estas perfektaj kemiistoj! Homoj ekkonas kemion en mezlernejo, poste ĝin studas en universitato, aŭ eble eĉ pli supre... Dume la kolomboj lernas nenio. Homoj laborante tie aŭ ĉi tie plejparte zorgas nur pri la salajro... Se unu homo ricevas pli multe ol la dua, tiam en la koro de ĉi lasta jam naskiĝas envio. Ĝi kreskas, disvastiĝas kaj plenigas la spacan sur la tero. En iom streĉa atmosfero necesas nur eta fajrero kaj la milito povas komenciĝi... Dume kolomboj neniam zorgas pri rekompenco, en ilia koro neniam regis iu ajn envio.

Post du monatoj mi vidis la kolombojn-gepatrojn aranĝi jam novan neston. Tamen pro la malamikeco de mia edzo ili tion ne plu sukcesis...

(daŭrigota)

POR BONE PREGI PER LA ROZARIO

GOJAJ MISTEROJ - 1. La anĝelo Gabrielo salutas la Virginon Maria.

La anĝelo Gabrielo estis sendita de Dio en urbon de Galileo, nomatan Nazareto al virgino fianĉinigita kun viro, kies nomo estis Jozefo, el la domo de Davido; kaj la nomo de la virgino estis Maria. Kaj irinte al ŝi, li diris: "Saluton al vi, la grace favorita, la Sinjoro estas kun vi". (Luko 1, 26-28; par.: Mt 1, 18-24; v. ankaŭ Jesaja 7, 14).

2. Maria vizitas sian kuzinon Elizabeta.

Kaj en tiuj tagoj, Maria leviĝis kaj senprokraste vojaĝis al monta regiono en urbon de Judeo; kaj enirinte en la domon de Zeĉarja, ŝi salutis Elizabetan. (Luko 1, 39-40; v. ankaŭ Luko 11, 27-28).

3. Jesuo naskiĝas en Betleĥemo.

Dum ili estis tie, venis la tempo de ŝia akuŝo. Kaj ŝi maskis sian unuan filon, kaj ŝi ĉirkaŭvindis lin kaj kuŝigis lin en staltrogon, ĉar me estis loko por ili en la gastejo. (Luko 2, 6-7; v. ankaŭ Jesaja 9, 6; Luko 2, 23; Jm 1, 14).

4. Jesuo estas dediĉata en la templo.

Kiam finiĝis la tagoj de la puriĝado de Maria laŭ la leĝo de Moseo, oni portis la infanon al Jerusalemo, por prezenti lin al la Sinjoro, kiel estas skribite en la leĝo. (Luko 2, 22; v. ankaŭ Levidoj 12, 1-7).

5. Jesuo estas retrovita en la templo.

Fine post tri tagoj ili trovis lin en la templo, kie li sidis meze de la instruistoj, aŭskultante kaj pridemandante ilin. (Luko 2, 46).

DOLORAJ MISTEROJ - 1. Jesuo agonias en la olivĝardeno.

Tiam iris Jesuo al loko nomata getsemano, kaj diris al siaj disĉiploj: "Sidiĝu ĉi tie, dum mi iros tien por preĝi". (Mateo 26, 36; par.: Marko 14, 32-42 Luko 22, 39-46; v. ankaŭ Johano 18, 1).

2. Jesuo estas skurĝita.

Pilato denove demandante, diris alili: "Kion do mi faru al tiu, kium vi nomas Reĝo de la Judoj?" Ili denove ekkriis: "Krucumu lin!" Kaj Pilato diris: "Kial? Kiam malbonon li faris?" Sed ili des pli kriadis: "Krucumu lin!" Tiam Pilato, volante kontentigi la homamason, liberigis Barabason, kaj, skurĝinte Jesuon, transdonis lin, por ke li estu krucumita. (Marko 15, 12-16; par.: Mt. 27, 22-25; Lk. 23, 22-24; Jm 19, 13-16; v. ankaŭ Jesaja 50, 6; 53, 3-8).

3. Jesuo estas kronita per dornoj.

Tiam la soldatoj de la provincestro, kondukinte Jesuon en la palacon, kunvenigis ĉirkaŭ li la tutan kohorton, kaj senvestiginte lin ili surmetis al li skarlatan mantelon. Plekinte poste kronon el dornoj, ili metis ĝin sur lian kapon kaj kanon en lian dekstran manon, poste, genuante antaŭ li, ili mokis lin, dirante "Saluton, Reĝo de la Judoj!" Ili kraĉis sur lin, deprenis la kanon kaj frapis per ĝi lian kapon. (Mt. 27, 27-29; par.: Mk. 15, 16-20; v. Jn. 19, 2-3).

4. Jesuo portas sian krucon.

Kaj ili prenis Jesuon; kaj li eliris, portante sian krucon, al la loko nomata Loko de Kranio, kiu estas en la hebrea lingvo Golgota. (par.: Mt. 19, 32-37; Mk. 15, 21-25; Lk. 23, 26-31; v. ankaŭ 1 Petro 2, 21-24).

5. Jesuo mortas sur la kruco.

Jam estis ĉirkaŭ la sesa horo, kaj fariĝis mallumo sur la tuta lando ĝis la naŭa, ĉar la sunlumo mankis. Tiam la kurteno de la sanktejo disĉiriĝis en la mezo. Kaj kriinte per laŭta voĉo, Jesuo diris: "Patro, en viajn manojn mi transdonas mian spiriton". Kaj tion dirinte, li ellasis for la spiriton. (Lk. 23, 44-46 par.: Mt. 27, 45-61; Mk. 15, 33-41; v. Jm. 19, 28-30).

GLORAJ MISTEROJ - 1. Jesuo reviviĝas.

Kaj la unuan tagon de la semajno, ĉe frua tagiĝo, ili venis al la tombo, alportante la aromaĵojn, kiujn ili preparis, kaj ili trovis la ŝtonon forrulita de la tombo. Kaj enirinte, ili ne trovis la korpon de la Sinjoro Jesuo. Kaj dum ili embarasiĝis pri tio, jen apud ili staris du viroj en brilaj vestoj; kaj dum ili timis kaj kliniĝis vizaĝaltere, tiuj demandis ilin: "Kial vi serĉas la vivanton inter la mortintoj?" Li ne estas tie ĉi, sed leviĝis; memoru; kiamaniere li parolis al vi, kiam li estis ankoraŭ en Galileo, dirante: "La Filo de homo devas esti transdonita en la manojn de pekuloj kaj esti krucumita, kaj la trian tagon releviĝi". Kaj ili rememoris liajn vortojn; kaj reveninte de la tombo, ili rakontis ĉiom ĉi al la dek unu kaj al ĉiuj ceteraj. (Lk. 24, 1-9; par.: Mt. 28, 1-8; Mk. 16, 1-7; v. ankaŭ Agoj 2, 22-24; 1 Korintanoj 15, 3-4).

2. Jesuo supreniras en la ĉielon.

Poste li enkondukis ilin apud Betania, kaj levinte siajn manojn, li benis ilin. Kaj tion farante, li foriĝis de ili kaj estis suprenportita en la ĉielon. Kaj adorkliniĝinte al li, ili revenis al Jerusalemo kun granda ĝojo. (Lk. 24, 50-52; v. Koloseanoj 3, 1-4 kaj Ijob 19, 25-27).

3. La Sankta Spirito malsupreniras super la apostolojn.

Kiam ekfiniĝis la Pentekosta tago, la apostoloj troviĝis kune en la sama loko. Kaj subite tondro, kvazaŭ blovego de forta vento, venis el la ĉielo kaj plenumigis la tutan domon, kie ili sidis. Aperis al ili dispartigitaj langoj, kvazaŭ fajroj, kaj sin metis sur ĉiun el ili. Kaj ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj komencis paroli en aliaj lingvoj, laŭ la parolpovo, kium la Sankta Spirito donis al ili. (Agoj 2, 1-4; v. ankaŭ 4, 31 kaj Nombroj 11, 25-29).

4. Maria estas prenita supren en la ĉielon.

Jem mi staras ĉe la pordo kaj frapas; se iu aŭdas mian voĉon kaj malfermas la pordon mi eniros al li kaj manĝos kun li, kaj li kun mi. Al la venkanto mi donos sidiĝi kun mi sur mia trono, kiel mi ankaŭ venkis kaj sidiĝis kun mia Patro sur Lia trono. (Apokalipso 3, 20-21; v. ankaŭ 12, 6 kaj Lk. 1, 46-55; 2, 28-30).

5. Maria estas kronita en la ĉielo.

Mirindaĵo ankaŭ vidiĝis: virino vestita per suno, kun la lumo sub ŝiaj piedoj, kaj ĉirkaŭ ŝia kapo krono el dek du steloj. (Apokalipso 12, 1; v. ankaŭ Cefanjo 3, 14-18; Alta Kanto 6, 10).

oo

EL LA REVUO OOMOTO, Jul.-dec. 1988, trad. Eizo ITOO

Koro ĵaluzanta,
koro envianta,
ho koro ne ŝatinda,
koro et-eta!

Ĉi tiu estas
koro homa!

Koro deziranta esti reĝo,
koro celanta esti ĉiopova,
koro volanta vidi de supre
ĉiujn aliajn pro sia bono.

Ĉi tiu estas koro homa,
avana, eta, abomena!

Penado por batali,
penado por venki aliajn,

penado abomena;

ĉi tiu estas

penado homa,

penado makulita

per sango kaj ŝvito!

Io farita pro utilo al la tuta homaro,

io farita kun sinofero pro bono,

estas laŭdata de Dio,

eĉ se ĝi estas "malbona".

Bonon faritan pro malico,

helpon al alia faritan por sia profito,

Dio kondamnos,

eĉ se ili aspektas "bonaj".

Hidemaru DEGUCI

oo

I.K.U.E.-membraro (daŭrigo)

29. S-ro TOURNAY; 30. F-ino STUTZMANN; 31. P-ro GOUDE; 32. S-ro MILLET; 33. S-ro VEDRINE; 34. F-ino GOUDE; 35. S-ro THIOLLIERE; 36. S-ino VINCENT.

oo

POEMO de R. DEGRELLE

Por mi la knabaro estas la espero.
De la estonteco dank! al dia ben!
Kiu baldaŭ ludos lerte sur monda scen!
Aktom kum viva frukt! ĉiam en prospero.

Fortom knaboj havas, same delikaton
Pro ilia junec kaj ilia malspert!
Ili kalkulas ja kum plenkreska avert!
Por atingi certe la iniciaton.

Por mi la knabaro estas vigla ĝojo,
Mondon ridiganta por komuna plezur!
Kaj ĝi havas forton kiel en la natur!
La tutjunaj ŝosoj kreskas el purrojo.

Kial do, ho fratoj, de Esperantio
Vi ne zorgas plie por ilia sukces?
Ĉu nia movado estas nura kermes?
Tamen junularo estas estonteco!

oo

F.K.E.A.-kongreso 1990

Ĝi okazos en Bouresse (Vienne) en la nova Esperanto-centro Kvinpetalo, de la 28-a de aprilo ĝis la 1-a de majo, kum ebleco restadi ĝis la 8-a de majo kaj partopreni kursojn diversnivelajn. La centro festos sian 5-jaran jubileon ĝuste la venontan jaron. Plia kialo por amase veni!

MALNOVA ANGLA LEGENDO, de John Langlois
(trad. Bernard Aunis)

Antaŭ tiom da jaroj okazis tio pri kio mi tuj parolos, ke eĉ la historiistoj forgesis ĉion el ĝi; ĝiam memoron konservis nur kelke da avinoj, kiuj ĝin rakontis al siaj genepoj en la jam malproksima tempo, kiam la infanoj ankoraŭ ŝatis aŭskulti belajn legendojn. Sed, ĉar tio nun perdiĝas, mi do volis skribi ĉi tiun rakonton, kiun la praavino de mia avino iam aŭdis en sia junaĝo, dum ŝi rigardis la fajrerojn dancadi en la kameno.

Ja neniam antaŭe la bela lando Anglujo vivis en tia mizero: pereis ĉiuj rikoltoj, difektite de la pluvo aŭ bruligite de la suno; la malsamo kaj morto deflugis sur la homojn kaj bestojn, la danaj predistoj venadis ŝteli ĉion de la kompatindaj kamparanoj, lasante al ili nenion por vivi. Dum la noktoj, pli migraj ol la infera mallumo, oni vidis la vagadon de ĝemantaj fantomoj, oni sentis sur si la blovon de la diabloj. Tuta popolo kriadis pro timo kaj ploradis en la preĝejoj, sed ŝajnis, ke Dio mem ne plu volas aŭskulti ĝin.

En tiu tempo sidis sur la trono la plej pia kaj saĝa el ĉiuj reĝinoj, kiuj iam estris Anglujon; ĉiutage ŝi iris al la kastela preĝejo kaj, kum koro rompita pro la malespero de ŝia popolo, ŝi petegis pri la Dia kompato; kaj ŝiaj regatoj vediris, ke, se eĉ ŝiaj preĝoj ne estas akceptataj en la Ĉielo, estas do senutile, ke kiu ajn provu kartuŝi Dion.

Eme de unu el la grandaj arbaroj, kiuj tiam kovris Anglujon, loĝis pia ermito, donanto de tiel saĝaj konsiloj, ke neniam homo konsultis lin vane; la ideo venis al la reĝino, ke ŝi eble povus demandi lin, kion ŝi faru por savi sian popolon el tiel granda premateco. Ŝi mem konsentus pri ĉio, kaj volonte sin enfermus en la plej severa monaĥinejo, se per tiu ofero de si ŝi povus redoni ĝojon al sia lando. Por iri al la ermito, ŝi kunprenis neniun brillan eskorton, sed mudpiede kaj sole, vestaĉite kiel pentantino, ŝi ekvojis preĝante, dum komencis fali la unua neĝo de la vintro.

Tuj kiam la Dia homo ŝin vidis, li kuris al ŝi kun larmoj en la okuloj: "Bona reĝino", li diris kun ve-spiroj, "tage kaj nokte mi preĝis la Ĉielon, ke li ne konduku vin ĉi tien; ĉar mi estas doloro pli granda ol vidi malfeliĉan koron, mi povante helpi ĝin; sed sciigu, ke Anglujo estas malbenita, kaj ke ĝis la fino de la mondo ĝi restos sub la povo de la demono. Antaŭ multe da jaroj via patro foriris por militi sur la kontinento, opiniante, ke li reportos gloron kaj riĉaĵojn, sed li estis tiel venkita, ke baldaŭ li vidis sin ĉirkaŭita de la francaj armeoj; jam li imagis sin kaptita, kaj eble ĵetita en malliberejon ĝis sia morto. Tiam en lian koron venis la abomena ideo voki la diablon por ricevi helpon? Tuj aperis Satano en lia tendo: "Mi jam scias, kion vi volas" li diris "sciigu do, kion mi mem postulas; ĉar mi ne bezonas vian animon (ĉu mi jam ne posedas ĝin?), necesas do, ke vi subskribu per via sango firman kontrakton, per kiu vi lasos al mi post via morto vian landon, kies vera reĝanto mi iĝos; kaj tiu kontrakto validos ĝis la tago de la Sankta-Neniama". Kiu ajn, krom via patro, kum abomeno rifuzus tiam oferton, sed li estis tiel forlasita de Dio, ke li konsentis kaj subskribis. En tiu sama momento la Francoj ekvidis, ke el ĉiuj punktoj de la horizonto alvenas menombreblaj armeoj: ĉiuj demonoj de la infero estis tie kun homaj vizaĝoj. Ne pensante eĉ pri memdefendo la malamikoj provis forkuri, sed ili estis tiele ĉirkaŭitaj, ke preskaŭ neniu povis savi sin. Via patro revenis do, kun grandegaj trezoroj en siaj ŝipoj; li konstruis belegajn urbojn, organizis brilegajn festojn; ankoraŭ nun la homoj ploras lin kaj sopiras al lia tempo, ne sciante, ke pro ĉi ili hodiaŭ tiom suferas".

Ĉiu divenas, ke tiu informo estis kvazaŭ ponardfrapo al la koro de la reĝino; ŝi falis preskaŭ senviva, kaj ŝi ne mortis nur per la Dia volo. La ermito relevis ŝin kaj vane serĉis en sia buŝo ian konsolan vorton; vidante en la okuloj de la sankta viro nedireblan malĝojon, ŝi pensis: "Ĉar li povas nenion por mi, mi nun pligrandigus lian malfeliĉon postulante iun helpon, kium li ne povas doni". Ŝi lin dankis, petis pri lia beno, kaj ekvojis revene kum premegata koro. Tiam landon Anglujo ŝi nun komprenis: "Mi ne plu estas la estro" ŝi pensis "omi kredas min reĝino dum la diablo tronas". De nun, malantaŭ ĉiu arbo, ĉiu vepro, ŝi divenis kaŝitan demonon, kaj ofte aperis kornhava vizaĝo, kiu diris: "Vi pravas, povra virineto: ĉi tie mi estas".

Siaj paŝoj kondukis ŝin al marbordo, kie terura vidaĵo atendis ŝin: danaj predistoj ĵus prirabis vilaĝon, mortigante tiom da homoj, kiom ili povis, kaj nun ili forfuĝas, spitante en siaj rapidaj ŝipoj la soldatojn alvenintajn tro malfrue.
(daŭrigota)

DIRAĴOJ el Chiara Lubich

1. Pri donacemo, Dio ne lasas sin venki.
2. La forto, kiu triumfigas la veron en la mondo estas via propra veramo.
3. Kiam Dio plenigas vin, diviĝu lin kun viaj amikoj.
4. Donu valoron al la ĝojoj kiel al la ĉagrenoj, al la bona kiel al la malbona sano. La ĉefa afero estas, ke Dio amas vin.
5. Por scii, studu; por scii pli, elektu bonan instruiston; por pli bone scii, instruu aliajn.
6. Zorgu pri la aliaj kiel pri vi mem, ĉar vi estas membroj unuj de la aliaj.
7. Se iam ni forlasus la malriĉulojn, la marĝenulojn, la senesperulojn kaj la pekulojn, ni forlasus Dion.
8. La kristano forte kaj konstante reagis kontraŭ la mezkvalito aŭ li me estas disĉiplo de Kristo.
9. Iu homo egalvaloras alian... kaj eble eĉ iom pli.
10. Ĉu iu el ni perdis sian postenon? Ni ĉiuj estas senlaboruloj. Ni ĉiuj serĉu laboron.
11. Fizika vivo en kontakto kun la naturo, kaj spirita vivo en kontakto kun Dio en ni kaj meze de ni estas la plej bona higieno.
12. Agu tiel, ke la aliaj sin sentu pli gravaj ol vi.
13. Vi taksos la seriozecon de via engaĝiĝo en la nunan tempon laŭ la ordo (aŭ la malordo!), kiun vi kreas post vi.
14. Maria ne faras longajn paroladojn, sed ŝi donas la parolvicon al Jesuo.
15. Vivi eme. Kreski en la interno. Elstarigi, ne por ŝvebi inter ĉielo kaj tero, sed por profunde enradikiĝi en la ĉielon.
16. La eterneco jam estas ĉi tie kaj nun.
17. La amo ĉion solvas.
18. Ne mallevu la brakojn!
19. Banala ago valoriĝas, se vi agas kun amo, per amo, estante amo.
20. Plenfide amekultu tiujn, kiuj amas vin envere.
21. Neniu aliru vin vane.
22. Se vi neglektas vian studadon, vi estas senrespondeca. Se vi studas por la poentoj, vi estas vanta. Se vi studas pro amo al Dio kaj al la aliaj, vi vere estas vi mem.
23. Nenia uniformo, nek insigno, se ne la ĝojo kiel nura distinga signo.
24. Ĉio rondiras: ĝojoj, ĉagrenoj, laboroj, esperoj, por ke neniu sin sentu apartigita.
25. Ni aranĝas niajn kunvenejojn per la gusto, stilo, eltrovemo de Krista, kiu vivas meze de ni. La fotegoj, ornamo, kolorharmonio esprimas niam komunan idealon.
26. Vi tion volas, Sinjoro? Konsentite!
27. Ne malvolonte luktu. Tio estas la ŝanco. Sen lukto me estas venko.
28. Nur unu afero estas bela, dezirinda, utila, alloga, luma: tio, kiom Dio proponas al ni en la nuna momento.
29. Ami liberigas.
30. La mondo estas belega, fascina, foje konfuzanta kaj malhela. Sed ekzistas universo pli mistera kaj atentokapta, estas via interna mondo, la ĉielo eme de vi.
31. Ekzistas pluraj metodoj por atingi Dion. La plej certa? Preni Marian ĉe vi. Krista sur la kruco diris al vi: "Jen via patrino!"
32. Komencu! Jes, sed kiam? Tuj. Ne atendu la tempon. La tempo me atendas vin!
33. Em la amo, gravas ami.
34. Por konkuri la mondon, vi disponas rimedon kontraŭam al la perforto, la mildcon. Fakte: "Feliĉaj la mulduloj, ĉar ili posedas la teron".
35. Kaj kial ne estingi sin, se estas por lasi la lumon brili en mi?
36. La plej bela momento en via tago? Estas, kiam vi preĝas, ĉar vi parolas kun via plej bona amiko.
37. Em Nazareto, oni laboris!
38. La bildo kaj la stilo, kiun ni volas, ne miksiĝas kun ekstravaganco kaj lukso, sed klopodas atingi la perfektecon de originala linio en akordo kun la profunda personeco de ĉiu.
39. Ĉu vi loĝas en riĉa vilao ĉu en domaĉo, vi povas fari el via loĝejo pacodomon.
40. Sanktulo estas viziulo, kiu konkretigas, kiom li vidas por la bono de l' homaro.
(daŭrigota)

ENHAVTABELO

- | | |
|----------------------------------|--------------------------|
| 1. Bileto de la prezidanto | Poemo (R. Degrelle) |
| 2. Karitatofermento | 5. Malnova angla legendo |
| 3. Por bone preĝi per la rozario | 6. Dirajtoj (C. Lubich) |
| 4. El la revuo "Oomoto" | 7. La boneco de Koto |

Kasistina angulo

KOTIZTABELO 1989

I.K.U.E. kum "Espero Katolika"	130 F
Peranto: P-ro Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.	

A.C.F.E. kum "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo	30 F
Geedza paro	40 F
Infano ĝis 16-jara, pastro, religiulo(in)o	15 F
Bonfaranto	150 F
Dumviva membro	600 F

U.F.E. kum "Revue Française" kaj "E ^o Actualités"	215 F
U.E.A. kum "Esperanto" kaj Jarlibro	225 F
Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.	

Dépôt légal: 3ème trimestre 1989	!! Polycopié par l' A.C.F.E.
C.P.P.A.P. n° 62 532.	!! Prieuré St-Martin.
Directeur: René-Claude Colas	!! La Houssaye(en-Brie
Directeur-délégué:	!! 77610 FONTENAY TRESIGNY
René-Jean Marmou	!! FRANCE

=====

Lastminute :

En la tago de la Virgina Ĉielenpreno, plaĉis al la Sinjoro revoki al si sian fidelan servantinon Jeanne MICHAU, nian karan amikŝinon kaj dumvivan anon de nia asocio. Jam de jaroj, ŝi senmanke partoprenis la konsidojn de la komitato, kies membro ŝi estis.

Ŝi lasos al ĉiuj memoron pri afabla, bonkora, servopreta kaj tre sperta, vera samideanino.

Ni preĝu por ŝi por ke ŝi pace ripozu.

+++++